


ESPERANTO JUNAS EN FRANCO

J *eun*



Sperant



INFO

Magazine de l'association JEFO

JEFO-INFORMAS BIMESTRIEL septembre / décembre 1996 N°96/4 25 FRF

PHOTOS...

DE...

VACANCES...

AUTOUR...

**DE LA
PLANETE...**

AVEC L'ESPERANTO !

3615 ESPERANTO



Adresaro de JEFO-komitatanoj

(☒ indikas nomon de letterskatolo ĉe minitel 36 14 CNX)

Prezidanto:

Bruno FLOCHON
6 C, av. de l'Hippodrome
69890 La Tour de Salvagny
☎ 04 78 48 00 40 (R) / ☒ CITRON

Sekretario:

Laurent VIGNAUD
25, chemin de la Brosse
49130 Les Ponts-de-Cé
☎ 02 41 30 08 70 / 02 41 69 70 12
☒ JEFO49

Kasisto:

Olivier MOREAU
48, rue Raffet
75016 Paris
☎ 01 42 88 51 58 / ☒ TAK

Yves BACHIMONT

Rés. des Elfes - appt 15
20, chemin de Bordeblanche
31100 Toulouse
☎ 05 61 49 32 15 / ☒ VIVAKVO
<yves.bachimont@meteo.fr >

Philippe BERIZZI

17, allée Jean-Baptiste Clément
78570 Andresy
☎ 01 39 70 78 15 (R) / ☒ JEFO78
<pberizzi@pratique.fr >

Bernard BOURON

Rés. "les Argonautes"
Bât. A - 521, av. Jack Kilby
06270 Villeneuve-Loubet
☎ 04 93 73 92 91 / ☒ ZIKO

Alain FAGOT

26, rue Berthe de Boissieux
38000 Grenoble
☎ 04 76 86 19 34 (R)
<Alain.FAGOT@imag.fr >

Tony GUYOT

8, rue Jules Guesde
35000 Rennes
☎ 02 99 31 32 78 (R)
Faks 02 99 35 09 44
☒ ROAZHON
<tony.guyot@matra-com.fr >

Pascal LECAILLE

BP 3019
69394 Lyon CEDEX 03
☎ & Faks 04 72 36 07 14 (R)
☒ PASCALL
<pascal@zen.dedal.fr.net >

Didier LOISON

15, rue Maurice Emmanuel
21000 Dijon
☎ 03 80 43 44 79
☒ DÍDĚ

l'agenda

de

JEFO



Les principaux rendez-vous que JEFO vous donne:

➔ 29 Janvier - 2 Février :

Expolangues à la Grande Halle de la Villette - Paris
Venez visiter le stand de JEFO, ou mieux: participez !

➔ 4, 5, 6 Avril :

Fromağa semajfino à Grenoble
Week-end sur le thème du fromage

➔ 1 au 7 Août :

FESTO à Saint-Raphaël
Méga teuf en perspective !

Pour avoir le calendrier complet,
connectez-vous sur :

36 15 ESPERANTO (T,29 F/mínute)
<http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo>

Nouveau ! Tous les troisièmes samedis de chaque mois, à partir de 14 h 30 au siège, JEFO vous propose une présentation de langues diverses. Le 18 janvier, ce sera l'arabe. Ensuite suivront le hongrois, l'italien, ...

EDITORIAL




Regardez bien cette revue, vous l'avez déjà vue il y a bien longtemps dans une lointaine galaxie.

Mais oui bien sûr, c'est le JI, le bulletin de JEFO !

Que s'est-il donc passé, pourquoi ce long silence ?

Eh bien JEFO a connu quelques difficultés et le rythme de parution du bulletin s'en est gravement ressenti. Mais 1997 est une autre année et nous allons faire en sorte que ce bulletin paraisse régulièrement avec un contenu riche qui soit à la fois informatif et divertissant. Vous recevrez le premier numéro du JI "nouvelle formule" dès la fin du mois prochain.



En attendant, et pour nous faire pardonner, nous offrons à nos membres un supplément avec ce numéro : il s'agit du livret des recettes réalisées pendant la êokolada semajfino, un nouveau concept de rencontres inauguré par JEFO. La prochaine est la fromaça semajfino, voyez le bulletin d'inscription au centre de la revue.

Je deviens donc le rédacteur de JI pour l'année 1997, aussi j'attends vos contributions pour les prochains numéros : envoyez vos articles, disquettes MAC ou PC, directement à mon adresse (voir page ci-contre). N'hésitez pas aussi à m'envoyer vos critiques, remarques, souhaits, suggestions, etc. sur la revue.

Il me reste donc plus qu'à vous souhaiter de joyeuses Pâques (comme ça, on sera au moins en avance sur quelque chose dans ce numéro !)

Tony



Le président nous cause !

là pour renseigner les visiteurs du salon 97 à la Grande halle de la Villette du 29 janvier au 2 février. Avis aux volontaires pour assurer les permanences.

Côté internet, les pages de JEFO se sont enrichies grâce à Marc et le cours fonctionne si bien que l'on prévoit de le rendre accessible à ceux qui ne sont pas encore connectés à internet.

C'est aussi en 96 qu'ont été lancés 2 projets importants pour JEFO : une vidéo en espéranto sous-titrée en français sur les activités et les rencontres de jeunes espérantophones, réalisée par *Ciro Gomes de Freitas*, cameraman brésilien de passage en Europe cet été, et un nouveau tract en couleurs pour informer les jeunes sur l'espéranto et, espérons-le, les inciter à rejoindre JEFO.

Je vous laisse découvrir bien d'autres nouveautés dans le rapport d'activités 95-96 réalisé par Laurent et qui sera prochainement publié.

En 1997, le rythme s'accélénera encore.

FESTO 97, prévue initialement à Grésillon, aura lieu à Saint-Raphaël du 1er au 7 août, juste à la suite de l'IJK. Le célèbre château espérantiste n'a pas souhaité recevoir tous les jeunes que nous annonçons... Alors rendez-vous pour camper sur la Côte d'Azur, à des conditions vraiment exceptionnelles pour la saison et l'endroit. Le programme, c'est promis, sera à la hauteur. L'équipe du LKK est déjà à l'œuvre... Il y en aura pour tous les goûts, repos ou sport, gastronomie ou artisanat, plage ou montagne, foule ou isolement, mais avec une constante : de la bonne humeur pour tous et à volonté !

Après le succès de la Ĉokolada Semajnfino, la tradition des gastronomiaj semajnfinoj est lancée. Dès les 4-5-6 avril, vous êtes conviés à Grenoble pour la Fromaĝa Semajnfino, où se déroulera aussi l'assemblée générale de JEFO. C'est le moment de préparer et d'envoyer vos candidatures, vos remarques et vos suggestions. Vous pouvez déjà vous inscrire grâce au bulletin encarté au centre de la revue.

En attendant les nombreuses occasions de nous rencontrer en 97, je vous souhaite une excellente année à toutes et à tous !

Jefonement vôtre,

Bruno

1996 ou 1997 ? Grésillon ou St Raphaël ?
Fromage ou chocolat ?

Pas de panique !

Si la fréquence de parution de votre revue préférée a subi quelques imprévus pendant la fin d'année 1996, JEFO est toujours là, plus que jamais !

En 1997, nous ferons le maximum pour que Jeunespéranto-Info retrouve un rythme de parution normal. Nous pouvons remercier par avance Tony pour son engagement dans cette délicate mission.

En attendant de recevoir (bientôt !) le prochain numéro (avec des surprises !), nous espérons que vous acceptez nos excuses et que vous allez continuer à nous soutenir.

C'est le moment de rappeler à ceux qui l'auraient "oublié" que le mois d'octobre marque (aussi) la rentrée de JEFO... sur le plan des cotisations. "Mais pourquoi faire ?" direz-vous. C'est la vraie question. Le bilan de l'année 1996 et les perspectives pour 1997 vont tenter d'y répondre.

Première nouveauté en 1996, des rencontres inédites. Entre les célèbres UK, IJK, KEF et IJS, les occasions de voyager, de faire la fête et de rencontrer plein d'amis du monde entier n'ont pas manqué encore cette année. Et dans le calendrier se sont glissés deux nouveaux rendez-vous : FESTO et la Ĉokolada Semajnfino. Leur succès nous permettra de les retrouver régulièrement à l'avenir et même de les multiplier.

Parmi les autres nouveautés de l'espérantie disponibles en France sont apparues cet été la nouvelle compilation de Vinilkosmo et une nouvelle BD d'Arnau (toutes les 2 disponibles à la JEFO-Butik').

Côté relations publiques, JEFO a participé début 96 à Expolangues et sera à nouveau

RAPORTO PRI FESTO

Devinte rezigni pri la Peterburga IJK kaj la posta IS, mi nepre volis partopreni en FESTO, des pli ke Liono kuŝas nur 200 km for de Diĝono, kie mi nune civilservas. Mi ne bedaŭras mian ĉeeston kaj pro la organizado, kaj pro la programo.

Pri la organizado: jes, estis kelkaj fuŝoj. Ekzemple la atendado antaŭ ĉiu manĝo, kvankam ni estis iom malpli ol cent. Ankaŭ la diseco de la kongresejo, la dormejoj kaj la noktejoj. Sed ravis min buseto, kiu ne nur navedis sed ankaŭ profesie reklamis pri Esperanto. Amuzege estis, la lastan vesperon, kiam ni provis malglui la literojn disde la buseto per plastaj manĝilaroj (vane) aŭ per boligita akvo kaj fingroj: la sceno disvolviĝis en la strata mallumeto de la Liona urbocentro kaj subite haltis... polica veturilo! Jen kelkaj aliaj bonaj ideoj: nomoj de dormoĉambroj sur la ekstera pordoflanko, disponigo de metro- aŭ bus- biletoj, kontakteblis la organizantoj per ilia portebla telefono...

La tema kaj distra programoj (festo kaj festo) estis abundaj. Temis jen pri la urbo (gvidataj promenadoj tra la malnovaj kvartaloj, vizito de muzeoj pri silkoteksado kaj *Beaujolais*-vino, manĝo en tipa restoracio, krozado sur rivero, ...), jen pri Esperanto-kulturo (teatraĵo de la Zagreba universitata klubo, kantoj de La Kampanoj, de Massimo, publika rokkoncerto de Jomo sur ŝipo...). Krome, mi ĝuis la revidon de sam- kaj eksterlandaj geamikoj. Fakte, mallonga aranĝo (4 tagoj), ne tro multthoma sed tamen internacia, rezultigis densan aktivecon kaj tempo forflugis.


Ni gratulu la organizan skipeton, kiu laboregis por tiu sukceso, sed venontfoje la organizadon zorgu pli larĝa skipo. Plie mi opinias ke samtempa okazo de la UFE-kongreso ja helpas al FESTO, kaj reciproke ĉeesto de diverslandaj gejunuloj al pli bona bildo de Esperanto antaŭ la amaskomunikiloj (vidu en lasta JI).

Didje'



Post la ĉokolada semajnfino en Chartreuse


Apenaŭ finiĝis la unua ĉokolada semajnfino en Francio kaj jam nun mi deziras publike dankegi ĉiujn aktorojn de la sukcesoj: Pascal LÉCAILLE (sekretariejo), Bruno FLOCHON (grafikaĵoj, gazetaro), Laurent VIGNAUD (libreto), Tony GUYOT (diversaj helpoj) kaj Jacques JOGUIN (lokano) de la organiza teamo kaj ĉiujn partoprenintojn, kiuj efike aktivis dum la tuta semajnfino.



Verŝajne ĉiu dece kondukis, silente suferis kaj ridete malkontentis. Neniu grava plendo venis ĝis miaj oreloj kaj okuloj. Mi nun atendas reagojn de ĉiuj partoprenintoj por certi ĉu estis sukcesa semajnfino aŭ ne. Ĉiuj rimarkigoj utilos por venontaj **Fromaĝa Semajnfino** (Grenoble, 1997-03), **Ĉokolada Internacia Seminario** (Claveyson, 1997-09) kaj **Fiŝa Semajnfino** (Montpellier, 1998-03), kiuj okazos kun ankoraŭ pli aktiva partoprenado de la ĉeestantoj. Partoprenontoj proponos siajn receptojn por frandi dum la renkontiĝo.

Mi atendis problemojn pro malfrua decido de okazigo de ĉi tiu semajnfino; pro izoleco de la semajnfinejo en la montaro (alkaj el-veturado, provizado de ĉokolado kaj vundeblecoj); pro komforto de la ĉambroj kaj konkurencio por uzo de la duŝoj; pro elekto de la menuoj kaj kondiĉoj de manĝado; pro pigreco por kuiru pladojn kaj purigi ilojn kaj lokojn; pro ŝtelemo ĉe la trinkejo kaj pro multaj aliaj malkvietigaj kialoj.

FAGOT Alain
Delegito de JEFO
pri ĉokolado
kaj gastronomio



SOMERO 96

Mi persone partoprenis en du aranĝoj: IJK kaj KEF.

Kion diri pri IJK en Güntersberge? Por jam partopreninti plurajn aliajn, mi taksus tiun... normala.

Tamen notindas kelkaj nekutimaĵoj:

- diskutprelego kun Gerlinde Kuppe, ministrino pri laboro, socialaj aferoj kaj sano de la lando Saksio-Anhalto,
- esperantolimpikoj, kun diversaj sportoj (piedpilko, retpilko, badmintono, ktp.) kiu sukcesis allogi kelkajn sportemulojn (ja tio ekzistas en Esperantio),
- teatraĵo la *Eta Princo*, ludata de junaj japanoj, kiuj faris la foran vojaĝon de kope,
- la francoj sufiĉe multe kaj mirinde malkrokodilis!!

Inter la diversaj dumtagaj programeroj, mi notis du interesajn en kiuj mi partoprenis:

- Revizio de PIV (Plena Ilustrita vortaro — ĉies biblio), organizita de Claus J. Günkel, fakte du temoj: kuirarto kaj fivortoj. Pri tiuj lastaj mi nun finfine aparte spertas. Diskuttrondo kun akraj bataloj. Atentu, se iu diras al vi ke la neĝulino iras al ĉokoladisto, perdu viajn infanajn revojn, temas nur ke kokainemulin' renkontas sian drogvendiston... Kaj, pri la dato de la apero de venonta PIV...


- Mitoj pri Esperanto, organizita de Ziko Zikosek. Oni tie analizis kelkajn kutimajn informojn sed ankaŭ misinformojn pri Esperanto, kelkfoje lanĉitaj de esperantistoj mem. Ekseis ekzemple ke en 1927, Esperanto fariĝis oficiale klara lingvo. Tio signifas ke ĝi ne estas ia sekreta kodo, kaj ĝin oni rajtas uzi. Tiu rajto perdatis en 1931 kaj revenis en 1958. Kaj... Ĉu vi iam demandis vin kial Ludoviko elektis "Doktoro Esperanto" kiel unuan nomon? Unue, Zamenhof estas tre malofta nomo, due en la germana, la vorto *Hoffen* signifas esperi. Oni ankaŭ suliĉe vidas en movada propagando ke Einstein subtenis Esperanton. Verfakte, tiu kiu diris ke "Esperanto estas plej bona internacia lingvo" nomiĝis Leopold Einstein, simpla esperantisto. Male, Albert Einstein diris ke li neniam apogos Esperanton.

Filip'

Rok-koncerto de PERSONE ▼



EKIPITA POR TROVI EMPLOI EN PARIS



KLOPODU METI KOMPUTILON EN LA LOKO DE LA CERBO POR FOVI REAGI TUJ AL TAUGA ANONCO INTER 2000 DIVERSAJ, POR KAPABU SANGI, LAŬNECESO: LINGVON, AKCENTON, ASPEKTON, KARAKTERON, IDIOSINKRAZIOJ, MORALO, ETIKON, RASOJ, SEKSOJ, ZODIAK-SIGNOJ (K. POR NENIAM FORGESI AKUZATIVOJ)...

RIDETEGO, JU PI IDIOTA DES PLI BONE, ĈEFE SE VI CELAS LABORI EN EURODISNEY

"WALK-MAN" KUN RADIO- "PROLETA-VENKO" AŬ KUN KASEDO DE "MEN AT WORK"

PORNAJ AFIŜOJ POR KONVINI LA DUN-GONTO

ANTAŬEN-IGITA UNU HORO, POR ESTI LA UNUA ALVENI EN LA DUNGEJO

EC SE MALPLENA, KUNHAVU BANKISTAN VALIZON POR GRAVIGI VIN

MARPOJ, DIPLOMOJ, CURRICULUMS, POŝT-KAR-

TDJ, REKOMEND-LETERO DE MITERRAND, J.VERNE, ETIKA, AŬ IU SIMILE FAMA; KAJ KROME ĈIAJN ILDOJN POR FALSI LA DOKUMENTOJN KIUJ MANKOS...

1* TIE VI DEVUS HAVI TIOM DA AĴOJ KIEL LA MUTULO DE LA "MARX-FRATOJ",... KIO AĴN, EKZ. VOLAPUK-VORTARO, POVUS ESTI BEZONATA.

MIRAKLE BLANKA SPACO!

ŜIKA ŜUD SUB LA BOTO POR ELEGANTE ENIRI LA DUNGEJON

SEN OMBRO MERDO!

LA VERDA STELO. INTERNE, KAŜITA, KE ONI NE RIMARKU KE VI ESTAS STRANGULO

INTELEKTULAJ OKULVITROJ, AŬ, EVENTUALE, SUNAJ-NIGRAJ POR KE ONI NE RIMARKU KE VI SUKCESIS VEKIGI NUR PRO KAFO KAJ DROGOJ DIVERSAJ, AŬ KE VI DAŬRE PLORAS PRO SENESPERIGA SERĈADO

VEKHORLOĜO KUN SILENTIGILO POR LA "TIK-TAK," AŬ ONI TAKSOS VIN TERORISTON

RAZIGILO, TONDILU,... NUR SE LA PROMESITA LABORO VERE VALORAS REZIGNI AL BARBO,... DO: MILIONOJ KIEL SALAJRO AŬ MADONA KIEL VIA SEKRETARINO, IO TIA!

SE VI DEVAS (DISKUTI PRI LA SALAJRO

GLADILO! VIAJ VESTAĴOJ NEPRE SENSULKAJ.

KONDOMOJ!

TELEFONO, TELEFONKARTO, TELEFON-RESPONDILU, MINITEL-KONEKTO, KTP

ĈAR ĈIUKAZE VI NENIAM TROVOS LABORON, FALSU PREMIIAN LOTERIO-BILETON

SANDVIĈO (TRE GRAVA)

MANUALO DE FRANCAJ POLITIKAJ SPECOJ, POR TAŬGE ELEKTI KOLOROJN, SAŬT-VORTOJN, AKCENTON, KTP, LAŬ TENDENCO DE DUNGONTO

"PAPILIO" AŬ KRAVATO ANKAŬ TIE ĈAR KELKAJ DUNGANTOJ PLEJ ATENTAS TIUN PARTON...

VORTARO PRI INFORMATIKO KAJ TERMODINAMIKO EN ANGLA, GERMANA KAJ JAPANA.

GENU-PROTEKTILO POR NE VUNDIGI KIAM ONI FORĜETAS VIN TRA LA FENESTRO ĈAR VI AŬDACIS PETI LABORON ESTANTE EKSTERLANDANO, AŬ SEN SUFIĈAJ DIPLOMOJ/MERITOJ/LABOR-SPERTO... (AŬ SIMPLE ĈAR, LAŬ LA DUNGUNTO, VIAJ AKSELOJ STINKIS)

BOTOJ POR PROMENI SENPROBLEME



POR HAVI SPACON EN LA METROO, POR ESTI LA UNUA EN LA VICOJ

SUBSKRIBO

HOMA SANGUO

Atentigoj :

- Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, se vi skribe anoncas tion. Ni alĝustigos la kotizon kiu ne povas malaltiĝi.
- Eksterlandanoj povos pagi surloke por ŝpari bankokostojn.
- Tiu kiu malaliĝas antaŭ la 20-a de marto ricevas sian pagon minus 60 FRF. Post tiu dato, la kotizo ne estos repagebla.
- La Duan Informilon vi ricevos ĉirkaŭ la 20-a de marto.
- Akceptado vendrede la 4-an de aprilo ekde la 17-a horo.
- La organiza teamo ne respondecos pri spontanaj frandadoj sed nur pri organizitaj frandadoj, kiuj okazos je la 10-a kaj 16-a horoj (kun pano) kaj dum manĝoj (gastronomiaj pladoj).



F&S

Fromaĝa Semajnfino


4-6 aprilo 1997 • Organizata de JEFO

Grenoble • Francio

Aliĝilo

*JEFO denove okazigas
aranĝon en rodanalpa
regiono. De la 4-a ĝis la
6-a de aprilo okazos kun-
tema semajnfino :
fromaĝo en ĉiuj pladoj.*

*Ĉiuj frenezuloj
renkontiĝos por frandi
fromaĝojn molajn, firma-
jn, aromplenajn, blujajn,
flavajn, blankajn, kun
ajlo, aromherboj, spicoj,
ktp. dum diskutrondoj,
vagadoj, kunsidoj, ludoj,
revoj...*



La Fromaĝa Semajnfino en kelkaj vortoj :



RECEPTARETO

Same kiel ni aranĝis por la Ĉokolada Semajnfino, publikiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la renkontiĝo.

Un livret de recettes sera édité à partir de vos propositions mises à l'épreuve.

FROMAĜO

Ni gustumados diversajn fromaĝojn aranĝitajn laŭ diversaj manieroj. Kiajn rilatojn havas la receptoj kun la regionaj kutimoj ? Kiun gravecon havas la fromaĝo en la regionaj receptaroj ? Ni jam prizorgas aranĝadon de la venontaj gastronomiaj semajnfinoj. Kiujn temojn ŝatas la frandemuloj ? Kie kaj kiam okazigi tiujn renkontiĝetojn ? Ni pridiskutos la politikajn aspektojn de la tradiciaj fromaĝoj. Kiel politikaj decidoj efikas sur aperon aŭ malaperon de fromaĝoj ?



Dégustations et préparations de fromages, planification des prochaines rencontres gastronomiques, importance du fromage dans les cultures régionales.

FESTO



Ni daŭrigos la preparadon de FESTO 97. Kiujn financajn rimedojn ni akiru ? Kiu kunhelpos dum disvolvigo de la aranĝo ? Kion proponi en la kultura kaj distra programo ?

Ressources financières, préparation et programme de FESTO 97

JEFO

Ni certe pugnobatalos pri strategio por disvastigi esperanton. Ĉu ĉiuj esperantoparolantoj estu nur varbantoj kaj organizantoj ? Ĉu disvastigo de esperanto dependas nur de gastronomiaj semajnfinoj ? Kiel ni kunlaboru translime ?

Stratégie de communication pour la diffusion de l'espéranto, actions des espérantophones...



KTP

Kaj se vi ne deziras diskuti iun temon, vi povos vagadi surborde de la torento Drac, kuiri en la renkontiĝejo, ludi en la parko... kaj frandi fromaĝon dume !

Aliĝilo :

Familia nomo : _____

Persona nomo : _____

Adreso : _____

Urbo, poŝtkodo kaj lando : _____

Tel. : _____ Retadreso : _____

Sekso : ina malina - Naskiĝdato : _____

Vegetaran-in-o : ne jes - Pezo antaŭ FgS : _____ kilogramoj

La tuta semajnfino inkluzivas la matenmanĝojn, la sabatan kaj dimanĉan tagmanĝojn, la vendredan kaj sabatan vespermanĝojn, du tranoktojn (4-5 apr. kaj 6-7 apr.) kaj provizadon de fromaĝo !

baza kotizo 330 FRF

kotizo por studentoj, senlaboruloj, naciservantoj... 280 FRF

se vi aliĝas post la 15-a de marto, aldonu 60 FRF

Vi ankaŭ povas rezervi :

la dimanĉan vespermanĝon 35 FRF

trian tranokton (6-7 apr.) 70 FRF

Dato kaj subskribo :

SUMO : _____ FRF

Tuta pago aŭ minimuma antaŭpago de 100 FRF al "JEFO LYON" per ĉeko aŭ mandato al : CCP (PoŝtĜirKonto) 8.929.15 H - Lyon.

Resendu tiun aliĝilon kun via pago al **Pascal LÉCAILLE B.P. 3019 FR-69394 Lyon Cedex 03** • Tel+Faks : +33 (0)4 72 36 07 14.

Retadreso : Alain.FAGOT@imag.fr (Alain Fagot) kaj pascal@zen.dedal.fr.net (Pascal Lécaille)

Grave :

Indiku se vi venos : aŭte ; trajne ; alimaniere : _____


Dato kaj horo de via alveno : _____

kaj de via foriro : _____

Pri alventempo ne vere gravas krom se estas post la 20a.

Cetere estas regule busoj.

FgS



**BULLETIN
D'ADHESION
10/96 À 09/97**
aligilo

TYPES DE COTISATIONS	Moins de 30 ans			Plus de 30 ans			Abonnement seul
	JEFO	TEJO + UEA	JEFO + UFE	JEFO	TEJO	UFE	
Tarif normal en FRF	170	140/320*	300	170	380	280	170
Tarif réduit (étudiants, chômeurs, appelés)	100	-	-	-	-	-	-
Donne droit à :							
Accès gratuit aux cours organisés par JEFO	✓		✓				
Tarif privilégié pour les rencontres organisées par JEFO	✓		✓				
Réductions sur la JEFO'butik	✓		✓				
Tarif préférentiel Pasporta Servo	✓		✓				
Droit de vote à l'assemblée générale de JEFO	✓		✓				
Revue JeunEspéranto Info (France)	✓		✓	✓			✓
Revue TEJO Tutmonde (Monde)		✓			✓		
Revue Koncize (Europe)	✓		✓	✓			
Revue Franca Esperantisto (France)			✓			✓	
Droit de vote à l'assemblée générale de UFE			✓			✓	
Jarlibro		✓					
Revue Kontakto (Monde)		✓			✓		
*Revue Esperanto (Monde) si cotisation 320 F		✓					
Formule(s) choisie(s) (cochez) :							
Adhésion «sympathisant» : (Donne droit à une carte de sympathisant)	----- FRF (minimum 30 FRF)						
Don à Jefo :	----- FRF						
Commande(s) Jefo Butik' :	----- FRF						
TOTAL :	----- FRF						

A remplir :

M/Mme/Mlle (rayez les mentions inutiles)

Nom nomo

Prénom antaŭnomo

Adresse adreso

Code postal postkodo

Ville urbo

Pays lando

Date de naissance naskiĝdato

Téléphone telefono

Télécopie faks'

B.A.L. minitel leterskatolo

Adresse Internet Internet adreso

Profession profesio

INFORMATIONS IMPORTANTES :

- **JEFO** = Junulara Esperantista Franca Organizo : organisation des jeunes espérantophones français ou JeunEspéranto France. JEFO est affilié à la fois à TEJO comme «section nationale» et à UFE comme «section jeunes». L'adhésion s'entend de octobre à septembre ou de avril à mars.
- **TEJO** = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo : organisation mondiale des jeunes espérantophones, affiliée à UEA comme «section jeune».
- **UFE** = Union Française pour l'Espéranto ou Espéranto-France, affiliée à UEA comme «section nationale»
- **UEA** = Universala Esperanto Asocio : association mondiale pour l'espéranto
- **Pasporta Servo** : guide d'adresses pour être hébergé gratuitement dans le monde entier lors de voyages à l'étranger, édité par TEJO.
- **Jarlibro** : guide mondial de tous les délégués d'associations ou clubs locaux d'espérantophones, édité par UEA.
- Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans.
- Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.
- Si vous adhérez à JEFO en cours d'année, merci de nous indiquer les numéros de *JeunEspéranto Info* et *Koncize* que vous n'avez pas reçus. Nous vous les ferons parvenir dans la limite des stocks disponibles.
- Si vous souhaitez que vos coordonnées restent confidentielles, cochez la case suivante :

Chèque postal, bancaire ou mandat lettre à l'ordre de "Espéranto Jeunes" à joindre à ce bulletin d'adhésion à : **J.E.F.O. 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS**

la JEF' O butik'

"La Danĝera Lingvo" de Ulrich Lins.
Historio de persekutoj kontraŭ Esperanto.

195 FRF.

Por JEFO-membroj :

nur 150 FRF !!

(inter krampoj)
Por JEFO-membroj

La HyperCard stako kiu prezentas Esperanton, por Macintosh komputeroj...

Farita de Cleve Lendon...

Tradukita en la francan de la klubo de Clermont-Ferrand... Senlime kopiebla.

Ekzistas en la angla kaj en la franca.



La eta reĝo (de Markos)	:	40	(20)	x	=
IMO (de Markos)	:	38		x	=
CERL Logopinglo	:	20	(15)	x	=
J.I. (po unu)	:	20		x	=
Disketo HYPERCARD (Fr / An)	:	50		x	=
E-Karaktraro por Macintosh	:	50		x	=
E-Karaktraro por Windows	:	50		x	=
T-ĉemizo 'Fek al neŭtralec'	:	50		x	=
T-ĉemizo Vinilkosmo	:	70		x	=
T-ĉemizo 3615 Esperanto ou tard...	:	60		x	=
Arnau Komiksoj* (2 albumoj)	:	60		x	=
Asteriks kaj la Normanoj	:	60		x	=
Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludoj	:	60		x	=
Dokumentujo (vidu sube)	:	60		x	=
Pasporta Servo 96-97	:	70	(60)	x	=
La Danĝera Lingvo	:	195	(150)	x	=
Assimil libro+kasedoj	:	390	(350)	x	=
Sendokostoj	:				+ 15

*bonvolu atesti, ke vi estas plenkreska

Speciala prezo por JEFO membroj : 350 FRF !

SUMO :

60 FRF

Nova dokumentujo eldonita de JEFO !

nigra




verda

La célèbre méthode Assimil "Esperanto sen peno" en coffret complet, c'est le livre... et les cassettes pour apprendre en voiture, ou pendant son jogging...

Ne forgesu kunmeti ĉekon, kaj skribi vian adreson... aliflanke de ĉi-paĝo !


Nova volumo de la aventuroj de Asteriks !



Komparu niajn prezojn...

...kun aliĉies !

Jen la nova T-ĉemizo, multkolora !



Vi dezirus, ke JEFO peru kaj disvendu vian produkton ? Ni atente pritraktos ĉiujn viajn proponojn.

Partoprenkondiĉoj :

◆ Tiuj prezoj inkluzivas por ĉiuj la loĝadon (6 tranoktoj) kaj la manĝadon (tri manĝoj en ĉiuj 6 tagoj) *krom* por memzorgantoj kiuj disponas nur pri loko por siaj tendoj. Oni liveros la manĝojn de la vespero de la 1-a ĝis tagmezo de la 7-a de Aŭgusto.

◆ La tendumantoj devas kunporti sian propran tendon, sed eblos loĝi sub komuna tendo kontraŭ surloka pago de 100 FRF por A-landanoj aŭ 50 FRF por B-landanoj. Kunportu vian dormosakon kaj matracon.

◆ La ĉambroj en la domoj estas du- aŭ trilitaj. Krome, la nombro de litoj en tiuj ĉambroj estas limigita, rezervu frue !

Aliĝo :

◆ La aliĝo ekvalidas de la sendodato de antaŭpago de 150 FRF por A-landanoj aŭ 50 FRF por B-landanoj.

◆ Tiu, kiu malaliĝas ricevas sian pagon minus la antaŭpagon kaj la sendelspezojn.

◆ Ni akceptas nur skribajn unuopajn aliĝojn. Grupa aŭ listigita aliĝo ne estos akceptata.

◆ Eblos transdoni sian aliĝon, kondiĉe ke oni skribu ateston pri tio. Oni alĝustigos la kotizon, kiu ne povos malaltiĝi.

◆ Partatempa partopreno eblas : dividi per 6 kaj obligu per la nombro de partoprentagoj. Partoprentago inkluzivas sinsekve vesper-, tranokton, maten- kaj tagmanĝojn.

◆ NEPRE KUNPORTU PRUVILON DE VIA PAGO !

tuttempa partopreno

partatempa partopreno de _____ ĝis _____

sub tendo en ĉambro memzorganto

mi bezonas lokon en la komuna tendo

mi ŝatus loĝi kun : _____

mi ŝatus manĝi vegetare

mi rezervas lokon en la buso inter IJK kaj FESTO

mi bezonas oficialan invitleteron por Francio, mia pasportnumero estas _____

por francoj, kotizo por JEFO : 100FRF 170FRF

mi estas pli ol 30 jaroj (je la 1-a de Aŭgusto 97) kaj krompagas 100 FRF.

Mi (antaŭ)pagis _____ FRF aŭ alia valuto : _____

ĝiro al Poŝtĝirkonto 8.929.15 H Lyon "JEFO LYON"

el la UEA-konto _____ - _____ al plec-a

Dato :

Subskribo :



Kiel atingi Saint-Raphaël :

Saint-Raphaël esta facile atingebla per aŭtoŝoseoj, per trajnoj el la najbaraj landoj kaj per aviadilo (flughaveno Nice Côte d'Azur).

Komuna vojaĝo de IJK ĝis FESTO :

Ni planas lui buson por tiuj kiuj partoprenos la IJK-on. Se tia vojaĝebleco interesas vin, nepre sciigu al ni pri tio sur la aliĝilo.

Sendu viajn aliĝilon kaj pagon al :

Pascal LECAILLE

B.P. 3019 FR-69394 Lyon cedex 03

Telefono + telefakso : + 33 4 72 36 07 14

E-poŝto : pascal@zen.dedal.fr.net

Por viaj pagoj, uzu ĉi-tiujn kontojn :

Poŝtĝirkonto **Lyon 8.929.15 H** por "JEFO LYON"

UEA-konto : **plec-a** - menciu "FESTO 97"

Por ĉiaj viaj programeroj kaj kontribuoj, kontaktu :

Tony GUYOT

8, rue Jules Guesde FR-35000 Rennes


Telefono : + 33 2 99 31 32 78

Telefakso : + 33 2 99 35 09 44


E-poŝto : tony.guyot@matra-com.fr



Internacia junulara renkontiĝo Saint-Raphaël - Francio 1 - 7 Aŭgusto 1997



Organizata de JEFO



For l'Enuo,
Sen Tema Optimismo!

Ĉu vi neniam revis sunumadi dum unu semajno marborde, en la "Côte d'Azur" en suda Francio ?

Kaj des pli se estus en esperanta etoso ?
Kaj se plie estus en Aŭgusto ?
Tuj post IJK ? Apud Italio ?
Kaj malmultekoste konsiderante, ke temas pri valora turisma regiono ?
Kun multaj surprizoj ???




JEFO proponas al vi konkretigi viajn revojn !!!

Dum unu semajno, ni invitas vin en Saint-Raphaël (Sankta


Rafaelo), vere marborde, 30 km de Saint-Tropez, 80 km de Nice, 120 km de la itala landlimo.

En dek-hektara parko kun pinoj, cikadoj, lavendo, rosmareno kaj olivarboj, vi tendumos agrable (aŭ, se vi preferas, vi povos loĝi en ĉambroj).



La mediteranea maro estas nur 20 minutojn piede kaj la eblecoj sportumi estas multaj : submara plonĝado, naĝado, veltabulo, sportaj padoj...

Por tiuj, kiuj preferas la naturon, la montaro "Esterel" estas tute apude : migradoj, biciklado....



Saint-Raphaël troviĝas en provenca regiono, fama pro ĝia parfum-industrio, la gusto de ĝiaj tipaj manĝaĵoj, la bunteco de la arte- kaj manfaritaĵoj, kaj la ĉarmeco de ĝia kamparo kun multaj promeneblecoj.

FESTO, kiel la unua eldono en Lyon en Majo 96, plu estos sentema, sed vi povos daŭre kontribui per viaj propraj programeroj.
Ne hezitu do !

Kotiztabelo

Ĉiuj prezoj estas en francaj frankoj (FRF).

	tendumado	ĉambro	memzorgantoj
ĝis 31/01/97	850	1300	340
ĝis 31/05/97	970	1400	410
poste	1090	1500	480

Por B-landanoj : rabato de 150 FRF por la tri loĝeblecoj kaj aliĝperiodoj.

Kategorio A : landoj kiuj ne estas sub kategorio B.

Kategorio B : Albanio, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, Pollando, Rumanio, Slovakio, ĉiuj landoj de la iamaj Sovetunio kaj Jugoslavio, de Afriko, de Sud-Ameriko kaj de Azio escepte de Israelo, Japanio, Koreio, Singapuro, Hongkongo.

Malrabato por pli-ol-30-jaruloj : 100 FRF.

Malrabato por francoj ne membroj de JEFO : 100 FRF por senlaboruloj, studentoj, nacieservantoj aŭ 170 FRF por aliaj situacioj. Tio farigos vin membro de JEFO por 97/98.

ALIĜILO POR  97

Familia nomo : _____

Persona nomo : _____

Adreso : _____

strato

poŝtkodo kaj urbo

_____ Lando : _____

Nask. : _____ ina malina

tt/mm/jj

Telefono : _____

Telefakso : _____

Retadreso : _____

UNUA INFORMILO

La Ikslandanoj
umas je aĵo.

Amason de batalantaj Nederlandanoj
oni dispelas per monkolektado.

La Belgoj provuzas ĉiujn alumetojn
por scii ĉu ili funkcias.

La Germanoj frapas kaj ordonas *Aŭfmaĥ'n!*
kiam ili estas manĝontaj ostron.



Ĉiam malvarmas kaj pluvas en Nederlando
dum Pasko.

A N T A Ŭ J U Ĝ O J

estas la temo de la dudek-iom-kaj-tioma

Paska Renkontiĝo

de la 28-a ĝis la 31-a marto de 1997
en Vught apud 's-Hertogenbosch, Nederlando

nederlanda esperanto-junularo
flandra esperanto-junulara asocio

ALIĜILO

Sendu la aliĝilon al:

David van Bezooijen
De Boogaert 28
NL-1901 GP Castricum

Telefonu al:

Jasper Sprengers
+31-24-3731417

Sendu retpoŝton al:

bb3s@stud.frw.uva.nl

B-landanoj kotizos:

antaŭ 16-2-97	90 NLG
16-2 ĝis 16-3	100 NLG
poste	110 NLG

B-landoj estas:

Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Rumanio,
Bulgario, Albanio, Grekio, Turkio, Portugalio,
ĉiuj ŝtatoj de eks-Jugoslavio kaj eks-Sovetio

A-landanoj kotizos:

antaŭ 16-2-97	150 NLG aŭ 2760 BEF
16-2 ĝis 16-3	160 NLG aŭ 2940 BEF
poste	170 NLG aŭ 3125 BEF

Rabaton ricevos:

- membroj de NEJ
- membroj de FLEJA
- ĉiuj junuloj malpli aĝaj ol 30-jaraj el landoj ekster Nederlando aŭ Belgio

je 10 NLG aŭ 185 BEF.

La aliĝo de A-landanoj validos post la alveno de antaŭpago je 30 NLG aŭ 550 BEF al:

- Ĝirkonto 2083695 en Nederlando, de *Nederlanda Esperanto-Junularo en Kampen*
- Ĝirkonto 000-1626639-46 en Belgio, de *Penningmeester NEJ en Kampen*
- UEA-konto **neja-p**

La aliĝo de B-landanoj kiuj ne povas antaŭpagi, validos post la alveno de de la aliĝilo.

Mi venos al Paska Renkontiĝo '97

NOMO
AĜO
ADRESO
.....
LANDO
SEKSO INA MALINA
TELEFONO
RETADRESO
VEGETARANO JES NE
MEMBRO DE NEJ AŬ FLEJA JES NE

Mi povas kontribui al la programo per

.....
.....

Mi antaŭpagis al

LA NEDERLANDA ĜIRKONTO
 LA BELGIA ĜIRKONTO
 LA UEA-KONTO NEJA-P
 MI ESTAS B-LANDANO
KAJ MI NE POVAS ANTAŬPAGI

Mi deziras gastigi

ĈE NEDERLANDANO AŬ FLANDRO
DE
ĜIS
se eblas.

Mi pretas gastigi

..... EKSTERLANDANO(J)N
DE
ĜIS
DATO
SUBSKRIBO
.....


nederlanda esperanto-junularo
flandra esperanto-junulara asocio

DU 23 FEVRIER AU 02 MARS 1997

PROGRAMME

BULLETIN D'INSCRIPTION
à retourner à Georges COMTE
07, Rue de L'ESPERANTO
09120 ST FELIX DE RIEUTORT

8^e



CHANT CHORAL et ESPERANTO

Ce stage est réalisé pour
le CHŒUR ESPERANTO TRANSPYRENE
par le Cercle d'Etudes Espérantiste de l'Ariège
avec l'aide du centre d'accueil de la Freychède
et des chorales locales.

INFORMATIONS: 0561.608.683 et 0561.681.744.

Chaque jour de 9 heures à midi et de 17 à 19 heures


CHANT CHORAL

Sous la direction de: Martina GAZDEK, chef de chœur à ZAGREB (Croatie). Interprétation d'œuvres traditionnelles, classiques, modernes et originales.

Les après-midi seront réservées au ski de fond, à l'étude de l'Espéranto ou à des visites touristiques et culturelles.

Les soirées seront dédiées aux jeux, à la détente, aux débats et aux échanges avec d'autres chorales locales.

N.B. : Si des stagiaires non-choristes assez nombreux s'annoncent, nous organiserons des cours d'initiation à l'Espéranto et des jeux aux heures "chant".



- ♦ Prénom:.....
- ♦ Nom:
- ♦ Né(e) le :
- ♦ Adresse :
- ♦ C.P. Ville :.....
- ♦ Téléphone :
- ♦ Profession :
- ♦ Voix : Soprano Alto Ténor Basse
- ♦ Je réserve :chambre(s) avec lit à 2 places
- ♦lits 1 place en chambre à 2-4 lits

TARIFS (sans hébergement)		
Inscriptions	jusqu'au 15. I. 1997	après le 15.I.1997
<15 ans ou 3e d'une famille participante	160,00 FFs	240,00 FFs
de 15 à 26 ans ou 2e d'une même famille	240,00 FFs	320,00 FFs
> 26 ans	320,00 FFs	400,00 FFs

Règlement à l'ordre de : C.E.E.A. CCP 2579 34 E TOULOUSE

Je verseFFs d'inscription
+..... FFs d'arrhes (minimum 500FF) pour
les repas et l'hébergement(comptez max. 1200 FF)

SIGNATURE:
(obligatoire)

En cas de désistement (jusqu'au 01 février) seuls les prix des repas sont remboursables

Kiel enspezi monon el Malesperantio per tradukservo?

Plurlingveco estas jam realeco de la ĉiutaga vivo de multnombraj civitanoj. Sur pakaĵoj de diversaj varoj aperas tekstoj plurlingvaj. La produktantaj entreprenoj metas plurajn lingvojn sur ununura pakaĵo pro ŝparemo. La samajn lingvojn ili uzas ankaŭ por komercaj rilatoj. Tiaj entreprenoj profitus Esperanton por traduki siajn tekstojn ajnalingven. ITRE jam funkcias tiucele.

Eventualaj klientoj de esperanta tradukservo estas malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj eksportantaj. Tiuj klientoj uzas plurlingvecon sur pakaĵoj de siaj varoj kaj por rilatoj kun partneroj. La helpoj proponitaj de la tradukservo koncernas jam uzitajn cellingvojn kaj pliajn cellingvojn pro malprogresivaj tarifoj. Tradukado de surpakaĵaj tekstoj povas esti mezrapida procezo dum tradukado de komercaj leteroj postulas fulmrapidan traktadon. El klienta vidpunkto ne ekzistas Esperanto. La scivolemaj scios pri uzado de racia lingva sistemo internacia. La scivolemegaj scios, ke temas pri Esperanto.

La tradukservo funkcias kiel interreto de retoj de tradukantoj. Ĉiu tradukanto havas propran reton de kunlaborantoj. Plej ofte tradukanto laboras nur kun sia reto tradukante al kaj el Esperanto. Tamen kelkfoje necesas peti helpon de centra kunordiganto. Ĉi tiu ekvilibras laborŝarĝojn inter retoj se traktendas enorma tasko aŭ se en iu reto mankas lingvo, kiu jam estas en alia. La centra kunordiganto ankaŭ povas kunigi spertulojn el pluraj retetoj en fakan reteton.

La tradukservo proponas tri tipojn de traduko: simpla, kunordigita kaj sekura. Simplan tradukon traktas nur alesperanta kaj elesperanta tradukantoj. De kunordigita traduko traktas al- kaj el-tradukantoj po parton; eltradukantoj kune finproduktas la tuton. Sekura traduko estas kunordigita traduko, por kiu ĉiuj altradukantoj ricevas la tutan tekston. Bazaj taskoj de tradukanto do estas alesperanta kaj elesperanta tradukoj kaj harmoniigo kun aliaj tradukintoj.

Individuo iĝas tradukanto skribante senerare ambaŭ sian lingvon kaj Esperanton. Kiam estas jam multaj tradukantoj por unu lingvo, tiam postulatas, ke la kandidato estu sperta pro altnivela lingvokapablo aŭ pro profesio aŭ fako. Por garantii profesiecan nivelon de la tradukadoj, akceptado en la centran reton dependas de la diplomoj kaj aliaj dokumentoj, kiuj atestas pri la kapableco de la kandidato. Per tiaj striktaj reguloj, la klientoj ricevu la plej kontentigan servon kaj mem varbu pri la tradukservo.

Pagante por efika tradukservo, la entreprenoj senkonscie financas agadojn esperantistajn de pluraj esperantianoj. Tradukantoj tamen konsciu, ke necesas aktive serĉi klientojn kvankam sufiĉe singardeme por eviti samtempajn pozitivegajn respondojn. Plia servo al entreprenoj estas eltrovo de rilatoj en landoj ankoraŭ ne rilataj; sed tio estas alia ideo alifoje traktota. Ekkunigu vian reton kaj kontaktu la centran kunordiganton S-on DURAND Daniel.

Hameleono

Internacia Tradukreto pere de Esperanto
p/a S-ro DURAND Daniel
Les Nids
FR-49190 SAINT-AUBIN-DE-LUIGNÉ
Tel k Faks : +33 (0) 241 784 775



Une vidéo en espéranto

Grâce à **Ciro Gomes de Freitas**, journaliste à la télévision brésilienne et ancien président de BEJO (équivalent de JEFO au Brésil), nous allons bientôt recevoir une cassette vidéo entièrement tournée en espéranto.



A partir de **10 heures d'images** tournées tout au long de l'IJK 96, lors de KEF et dans quelques autres villes d'Europe où il est passé durant ses deux mois de séjour sur le continent, **Ciro** va préparer et monter un film d'une trentaine de minutes avec la bande son et le sous-titrage des noms des différentes personnes interrogées.

Le but est de montrer un mélange d'images pour donner une bonne idée de l'ambiance des rencontres internationales de jeunes, de l'enthousiasme et de la diversité des participants.

Cette vidéo a pour ambition d'être diffusée dans le monde entier auprès du public, soit lors de conférences ou de stands, soit dans les groupes locaux eux-mêmes, voire à la télévision si l'opportunité existe.



Seul problème technique à ce jour : le sous-titrage dans les langues nationales. Comme vous l'avez compris, la cassette aura une bande son en espéranto, parole et musique (grâce à l'accord d'EUROKKA). Mais la présentation au public exige un sous-titrage, notamment pour une diffusion sur un salon.

Si vous avez des contacts dans l'audiovisuel pour réaliser le sous-titrage de cette vidéo à partir du texte en

français que nous fournirons, merci de nous en avertir. L'original est en standard PAL en S-VHS.

Ce projet est né très rapidement sur proposition de **Ciro** au début de l'IJK. Proposé au départ à TEJO, il a failli ne pas naître, les finances de l'association mondiale ne permettant pas de financer les frais de séjour de **Ciro** à l'IJK et ses cassettes, seuls frais demandés pour la réalisation du master. Tout le montage réalisé au Brésil par **Ciro** sera effectué bénévolement.

Afin de ne pas manquer cette occasion exceptionnelle de disposer d'un matériel de qualité, JEFO a proposé à **GEJ** (Allemagne), **USEJ** (Etats-Unis) et **IEJ** (Italie) de co-financer ce projet, ce qui a été accepté. JEFO est le coordinateur du projet et chaque dépense est partagée entre les 4 pays. Un sous-titrage sera donc nécessaire dans les 4 langues nationales. Les copies seront vendues et leur profit (s'il y a) sera réparti entre les 4 associations.

En attendant la cassette originale, il ne reste plus qu'à résoudre la question du sous-titrage et de la copie en nombre...

Bruno



MALESPERANTIO

Radio France International, Julio, parolis dum dek minutoj pri Universala Kongreso en Prago.

(informas Michel Slagmulder)

BUSINESS LIFE the magazine for Europe eldonita de *British Airways*, Julio-Aŭgusto 96, interesa artikolo "A language for Europe" opiniigas du malsamajn vidpunktojn: tiun de s-ro Jenner kiu favoras la anglan, kaj tiun de samideano Kep Enderby kiu finiĝas jene: "the task of the present generation of Esperantists is to keep Esperanto alive until the world wakes up and decides it needs it." (tasko de nuna generacio de la esperantistoj estas teni Esperanton vivanta ĝis kiam Eŭropo vekigis kaj decidis ĝin bezoni).

(informas Jeanne-Marie Cash)

Mon Quotidien, ĉiutaga revuo por infanoj 10-15 jaraĝaj, Vendredon 12an de Julio, reportaĵo pri la 9 ukrainaj infanoj invitataj de klaso CM1/CM2 apud Tuluzo. Tiu aranĝo organizatis de Esperanto Kultura Centro. Ĵurnalistoj aldonis bazajn informojn pri Esperanto kaj adreson de UFE.

(informas Jeanne-Marie Cash)

L'histoire Spécial, *Parlez-vous espéranto?* (ĉu vi parolas Esperanton), subtitolita "L'explosion des nationalismes de Valmy à Maastricht", numero 201, Julio-Aŭgusto 96, iom svaga sed kun pluraj pravajoj.

(informas Jean-Pierre Danvy)

L'Itinérant (eksa *Lampadaire*), revuo surstrate vendata de senlaboruloj, okazigis plurajn interŝanĝojn inter numeroj 86 ĝis 96, pri Esperanto. Unue, samideanino Joëlle Huet sendis leteron al la revuo. La respondeculo pri kuriero faris aparte stultan kaj malagrablan respondon. Sekve esperantistoj, ĉefe per rebatoservo de SAT-amikaro, sufiĉe forte kaj grupe reagis, opiniante ke la revuo respondis malĝentile kaj

fuŝinforme al Joëlle. La revuo konsentis pri sia tro fuŝrapida reago, sed tamen ne vere petis pardonon kaj gardis samtipan sintenon. Poste publikatis aliaj leteroj de esperantistoj, kaj ankaŭ leteroj de malesperantistoj taksantaj la polemikon troiga. Estas malfacile resumi la interŝanĝojn, sed la plena dosiero troveblas ĉe SAT-amikaro. Tamen tiu afero iel memorigas samtipan kiu okazis iam kun revuo *Science & Vie*: iu ĵurnalisto fialudas pri Esperanto, sekve kun organizata rebato multaj esperantistoj amase kontraŭskribas al la ĵurnalo. Kelkajn interesajn konkludojn, aŭ almenaŭ rimarkojn oni povas fari, studinte tion:

- unu sola stultulo en trafa posteno de gazeto povas facile kaj larĝskale misinformi kontraŭ Esperanto,
- esperantistoj estas sufiĉe efike organizataj por rebati, preskaŭ tro organizataj, ĉar fine la reagoj aperas kiel tute ne naturaj (venis leteroj al *L'itinérant* el regionoj kie ĝi ne estas vendata),
- samideanoj rebatas vigle kaj kelkfoje agressive, kiel vanditaj en sia propra kerno, tiun reagon taksas tute troiga neesperantistoj,
- en la plej klasika propagando por Esperanto, mankas humuro kaj ekstera vidpunkto,
- rebati pli utilas kiam ankaŭ informi.

Ideo...

Sciante ke se ni estus, nu, dekfoje pli multnombraj:

- libroj en Esperanto vendatus dekfoje pli rapide kaj konsekvence estus pli novaj kaj ofte reeldonataj,
- aŭ la libroj estus eldonataj je dekfoje pli da ekzempleroj, do kostus malpli multe kaj pli bone enspezigus siajn aŭtorojn/eldonistojn/perantojn,
- tiu merkato, ŝajne profitodoniganta, allogus novajn kreantojn, kaj iom post iom alprosimigus nin al la ekvilibropunkto, kiam oni povas enspezi per Esperanto, do benevola partatempa hobia fariĝas plentempa profesio.

Ĉio tio ja belas, sed ve... ni ne estas dekfoje pli multnombraj.

Tamen... ekzistas fako pri kiu ni povus dekobligi niajn vendojn: tiu pri vortaroj!


Kion faras vi kiam vi iras por vojaĝi en Moldovalakion? Vi aĉetas vortaron franc-moldovalakan!

Kial vi ne aĉetus vortaron Esperanto-moldovalakan?

Se ĉiuj esperantistoj aĉetus vortarojn Esperanto-XX prefereble al vortaroj nacia lingvo-XX, nu... tio videble multobligus la vendojn.

Kaj do... relegu la komencon de ĉi mesaĝo.

Filip'



MALLONGE...

TEJO-seminario en Budapeŝto

TEJO organizas seminarion por junaj aktivuloj en Budapeŝto de la 27a de Aprilo ĝis la 4a de Majo. La temo estos "INFORMADO: Aŭdigi niajn voĉojn". Antaŭvideblas laborgrupoj pri verkado de gazetaraj informoj, organizado de gazetara konferenco, intervjui kaj intervjuiĝi, preparado de TTT-paĝo. La prezo estas ege alloga: la kotizo estas 225 francaj frankoj kaj la vojaĝkostoj estas repagataj komplete.

JEFO bezonas esti reprezentota de almenaŭ unu partoprenanto. La aliĝilon vi petu rekte al JEFO.

Eŭropa Parlamento en Stuttgart


Germana Esperanto-Junularo invitas vin al Eŭropa Junulara Parlamento en Stuttgart de la 13a ĝis la 16a de Majo.

Ankaŭ tie JEFO bezonas reprezentantojn, petu de ni la aliĝilon.

ET AVANT DE FINIR...

Le mois prochain, vous recevrez un nouveau JI tout nouveau, tout beau avec de nouvelles rubriques, la première leçon d'un cours d'espéranto pour les débutants, un rapport sur l'IS, la présentation des nouveaux projets de JEFO et plein d'autres choses encore.

Enfin, tout ça seulement si on arrive à réveiller le rédacteur...



Le conseil de JEFO :

JUNULARA
ESPERANTISTA
FRANCA
ORGANIZO
Jeun Esperanto France
4 bis, rue de la Cerisaie
75004 PARIS

36 15 ESPERANTO
34 14 CNX*#JEFO
<http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo/>

Direktoro de la eldono:
Bruno Flochon

Redaktoro:
Tony Guyot

Desegnoj:
Arnau, Christophe Ledreux

Partoprenis al tiu numero:
**Philippe Bérizzi, Alain Fagot,
Bruno Flochon, Pascal Lécaille,
Didier Loison, Laurent Vignaud**
kaj la kontribuintoj de la rubriko
"Malesperantio".
Dankon al ĉiuj!

Tiu ĉi numero kompostatis komputile komence de
Januaro kaj presatis je 300 ekzempleroj. Por
aliĝi al JEFO kaj ricevi regule *JEFO-informas*,
plenigu kaj sendu la aliĝilon inter la centraj
paĝoj. Ne forgesu ke JEFO deĵoras ĉe la sidejo
(adreso supre) ĉiujn unuajn kaj triajn sabatojn
ĉiumonate, ekde la 14a horo (kurso je la 17a).
Sendu viajn artikolojn antaŭ la fino de Januaro
por la unua numero de 1997. Ne forgesu ankaŭ
fotojn, desegnojn, ktp. Ĉiuj kontribuoj
bonvenotaj!

*Ce numéro a été composé par ordinateur début
janvier et imprimé à 300 exemplaires. Pour
adhérer à JEFO et recevoir régulièrement
Jeunespéranto-Info, remplissez et renvoyez le
bulletin d'adhésion situé entre les pages
centrales. N'oubliez pas que JEFO tient une
permanence au siège de l'association (adresse
ci-dessus) chaque premier et troisième samedi
du mois, à partir de 14 heures (cours à 17
heures).*

*Envoyez vos articles avant fin janvier pour le
premier numéro de 1997. N'oubliez pas les
photos ou dessins pour illustrer ces articles.
Toutes vos contributions sont les bienvenues!*

La artikoloj en *JEFO-informas* reliefigas la
vidpunkton de ties aŭtoroj, ne nepre tiun de
JEFO. Tamen JEFO permesas al si la rajton
publiki aŭ ne tiujn artikolojn. Represaĵoj estas
permesataj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de
la aŭtoro kaj la fonton kaj ke JEFO estu
informita.

*Les articles parus dans JeunEspéranto-Info
n'engagent que leurs auteurs. Toutefois JEFO
se réserve le droit de les publier ou non.
Tous droits de reproduction autorisés sous
réserve d'indication de l'auteur et de la source
et sur simple information à JEFO.*

Imprimerie: spéciale
Dépôt légal: à parution
Commission paritaire: en cours

**surtout ne participez jamais à une rencontre d'espéranto,
voilà ce qu'il peut vous arriver :**



Avant l'IS



Après l'IS


Jean **E** Sperant INFO

vous présente les autres revues auxquelles vous pouvez vous abonner grâce à **JEFO** :



ESPERANTO mensuel édité par UEA

KONTAKTO bimestriel édité par TEJO/UEA



KONCIZE bimestriel édité par les associations de jeunes espérantophones européennes



FRANCA ESPERANTISTO mensuel édité par Espéranto France



TEJO TUTMONDE bimestriel édité par TEJO